GISTO-AGO-2006.
Georgo O. Vaske
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
ttt-kongrua skribo

.....

IDEO

Far Eriko Verissimo

Ideo por verki estorion: Viro vekigxas en sia lito. Sola. Li havis strangan songxon. Trairis grandan placon. Gxuste en gxia centro staris lokomotivo. Li pensis: se mi kapablos transsalti gxin, tio signifas ke mi songxas. Se ne, mi estas veka. Vekigxas. Li songxadis. Tuj poste li forgesas la songxo?. Li pensas: kion mi faris en la antaùa nokto? La kutiman. Televidis. Vizito al la fridujo antaù ol kusxigxi. Nenio mangxebla krom jogurto kun utildato pasinta. Prenas glason da akvo gxis flanke de sia lito. Neniam li trinkas ion dum la nokto sed al li plachas scii ke la glaso staras tie, preta en kazo de neceso. Li ellitigxas kaj iras banejen, urinas, rigardas sin en la spegulo. Pensas:mi ne volas esti rolulo de iu ajn estorio. Jam troas estorioj tra la mondo. Chi tiu finigxas chi tiel. Kaj reiras al sia lito.

El MIKROFONE/14

Direktoro Wang de CHO-RO-I, en la jxurnalo MIKROFONE, deklaris ke en la venontaj 5 jaroj CRI starigos 100 FM-radiojn kaj mezondajn staciojn en aliaj landoj, por pliefike kovri evoluantajn landojn de Azio, Afriko kaj Latin-ameriko ankaù landojn de Norda ameriko kaj Eùropo kun sama prospero pere de la interreto = CRI Online. Chefe plachas la novajxo, ke multe pliaj homoj kaj same esperantistoj, kiuj ne kapablas teni komputilon povos audi FM- kaj AM-radiojn.

“**Unu mondo, unu songxo**”

surglui afisxon

Jen, supre, E-stimulilo al azianoj kiujn vi eble iam kontaktos per skribajxo.

DANKMESAGXO

Pere de MIKROFONE nia gaùcha londonano Lenio Marobin, ILERA-sekretario, ricevis dankesprimon de VANIA, filino de la jxus forpasinta samideano Attilio D’Attilio, pro la kondolencoj prezentitaj nome de la esperantistaj radioamatoroj. Mia granda amiko Lenjo, fidinda lertulo pri chio kion li entreprenas, tenas kvazaù esperantistan ambasadejon en Londono. Chiujare li venas al la “Jungle” por viziti panjon kaj sian grandan parencaron en Lajxeado-RS kaj ne forgesas veturi al Kaiurbo akcepti fortan 73 de radio-kolegoj kiuj lin alte estimas kaj proponas tranchi churaskon, kaj rakonti pri la vivo kaj moroj en Britio.

SALUTO far LINA.

Sxi, redaktorino de la sabata programero “Esperanto en Marsxo” far CRI, pere de Gisto salutas gesamideanojn kiuj ne ricevadas la bele kaj bunte presitan jxurnalon MIKROFONE. Sxi proponas sian adreson: lina68@tom.com. Aù, surpapere: Esperanto-redakcio, China Radio Internacia – Pekino – CHINIO 100040. Sxi bonvenigas diskojn kun E°-tekstoj/muzikoj/fotoj.(ankaù vian) Do akceptu sxian proponon, diskonigi viajn belajxojn, kulturajxojn.

Enivaldo:“Pri via vivo ne faru skizon, eblas ke ne restos tempo finverki gxin!

KAÙZI PLEZURON

Chiuj ni sxatas komplezi geamikojn, chu ne vere? – Jen recepto chipe komplezi forajn, ne konatajn geamikojn kiam E-komunumo anoncas ke gxi okazigos ekz. letervesperon. Ofte okazas. Sufichas ke oni alsendu simplan posxtkarton kun presita esperantajxo (el tiuj kiujn mi uzadas, kun eta E-leciono. Gxi bone efikas). Kelkajn tagojn antaùe mi ricevis, pere de Interneto kortusxan dankesprimon el Samarkand, Rusio. Tial mi ne sukcesas kompreni, kial gaùchaj gesamideanoj tiom zorge evitas uzi Posxtkartojn. Oni rajtas pensi ke gaùchoj sxatas senti kapdoloron pro batalo kontraù sia konsciencriprocho, pro la “forgeso”, por ne diri pigrecon por skribi kelkajn vortojn per kiu ili kaj brazilo sin prezentas.

CHU DISKRIMINACIO?

Nete rimarkeblas ke la Klero, inkl.la katolikaro evitas Esperanton, malgraù ke kelkaj sagxaj pastroj aktivas por multigi la nombron de “verduloj” en siaj vicoj. La plej esperiga homo Karol Vojtila, kiel civilulo lideris E-grupon en Polio sed, post kiam li farigxis papo la kristanaj esperantistoj elrevigxis pro liaj nuraj salutoj dum specialaj eventoj. Multjare oni kulpis pro manko de suficha klarigo, ke Esperanto neniel rilatas al Spiritismo krom kiam gxi sagxe uzas chi lingvon por facile disvastigi sian doktrinon tra la tuta mondo pere de libroj presitaj en sia eldonejo en RIO. Kristanoj legu, pri tiu temo,”Esperanto, o novo Latim da...” chefe religiuloj char oni komencas suspekti ke klerikuloj ne akceptas kaj helpas disvastigi la noblan iniciaton Esperanto pro tio, ke gxi estas verko de Zamenhof, kiu estis judo. Tio ja estus rasa diskriminacio heredita de la nazioj.

CHU MANGXI VIANDON?

Se oni gxisfunde plenhoneste rezonadas pri la dietoj, chu vegetarana aù viandomangxa, oni nepre alvenas al la sxoka konkludo, ke gxi estas, (pardonu mian malkasxan aserton), sangosoifa fikutimo. Mi pravigas min kaj la gelegantoj eble konsentos, kondiche ke ili sciigxis pri la mistraktoj necesaj, por liveri la amasajn kvantojn da viandoj al la vendejoj. Permesu ke mi mense bildigu al vi iomete de la suferojn truditajn al bredataj bestoj. Kokidoj tuj perdas sian bekon, detranchite, por ke ili ne voru unu la aliajn, kunpremitaj en ege malgrandetaj kagxoj de kie ili nur eliros por suferi tranchojn en la gorgxoj. Bovidoj estas disigitaj de iliaj patrinoj. Sopire blekadas ili kaj la patrinoj. Ankaù ili restadas metitaj en kvadrateton kie ili povas fari nur pokajn pasxojn, por ke ilia viando restu tenera. Porkidoj restas che la patrinoj dum nur du monatoj, dum ili mamas. Poste ankaù ili estas senkompate disigitaj de la porkino por ke sxi sen tempoperdo gravedigxu kaj la ciklo rekomencas gxis ankaù ili ricevos marteladon sur la frunton kaj devas elversxi la tutan sangon, por ke vi viandovorulo sentu plezuron koste de diluvo el sango de senkulpaj bestoj. Multa teruro ankoraù aldoneblus krom tio, ke viandomangxaj homoj estas multe pli agresemaj ol vegetaranoj.

RIDO SANIGAS.

Malsukcesa Atako

Oldulino starigxas antaù gicheto de banko kaj serche revolvas la enhavon de sia mansako dum tuta minuto. Malantaù sxi la vico kreskas. La kasisto afable avertas sxin, ke aliaj klientoj atendas en longa vico. Fine sxi malkontenta plendas: “Ba, tro da ajxoj en mia mansako malhelpas min trovi la pafilon” kaj rezignas...